

# Jupitero

Jupitero estas la kvina kaj la plej granda planedo de nia sunsistemo. Ĝi havas la nomon de la romia reĝo de la dioj, Jupitero.

Jupitero estas unu de la gasgigantoj, kiuj laŭ ĝi ankaŭ nomiĝas jupitersimilaj planedoj.

Videbla per nuda okulo en la nokta ĉielo, Jupitero estas la kvara plej brilanta objekto post Suno, Luno kaj Venuso.

La alta atmosfero de Jupitero komponiĝas, en nombro da atomoj, el 93% da hidrogeno kaj 7% da heliumo. En maso, estas 75% da hidrogeno por 24% da heliumo. La restanta 1% venas de spuro de aliaj elementoj en kemiaj kombinaĵoj: metano, etano, vaporo de akvo, amoniako, oksigeno, hidrogena sulfido, fosfino kaj neono.

Malsimile al la Tero, Jupitero ne havas klarajn limojn inter tero, ĉielo kaj maro. Anstataŭ tio, kiam oni subiras al la centro de la planedo, la nubaro fariĝas densa nebulo, maro (de metala hidrogeno), koto, kaj poste roko. La roka parto de Jupitero estas 10-15-oble pli granda ol la Tero, sed la ĉefa parto de la planedo ne estas roko aŭ nuboj, sed giganta maro de metala hidrogeno. La maro probable enhavas heliumon kaj metanan glacieron.

La zonoj de nuboj videblaj en la bildoj de Jupitero estas zonoj de ventoj. La ruĝaj nuboj estas la pli altaj, la bluaj nuboj la malpli altaj (de la nuboj videblaj).

La plej fama ŝtormo sur Jupitero estas la Granda Ruĝa Makulo, malkovrita de Cassini antaŭ tri jarcentoj. Ĝi estas 12 000 km - 25 000 km, la grandeco de du Teroj, kaj estas pli alta ol la ĉirkaŭaj nuboj.

Jupitero havas 49 lunojn oficiale agnoskitaj de la Internacia Astronomia Unio. La kvar plej grandaj lunoj estis malkovritaj de Galilejo, kiam li celis sian teleskopon al la nokta ĉielo. La malkovro ekruinigis la kosmomodelon de Ptolemeo.

Je la 16-a de julio 1994 ĝis la 22-a, la kometo Shoemaker-Levy 9 koliziis al Jupitero. La efikaĵoj de la kolizio estis videblaj ankoraŭ du jarojn poste. Krateroj de similaj kolizioj estas videblaj sur la surfacoj de Ganimedo kaj Kalistoo.

Jupitero ludas esencan funkcion en nia stelsistemo. Ĉar ĝi estas pli masa ol ĉiuj aliaj planedoj kune, ĝi estas esenca parto de ekvilibro de masoj de la sunsistemo. Per sia maso, Jupitero stabiligas la asteroidan zonon. Sen Jupitero, laŭstatistike teron kolizius ĉefzonoj asteroidoj post ĉiuj 100 000 jaroj, tiel igante teron malloĝebla. Pro tio la ĉeesto de jupiter-simila planedo en planedsistemo supozeble estas kondiĉo por vivo sur planedoj pliproksimaj al stelo.

Retpaĝo: [www.traduki.de](http://www.traduki.de)

Teksto: [eo.wikipedia.org/wiki/Jupitero\\_\(planedo\)](http://eo.wikipedia.org/wiki/Jupitero_(planedo))